

# La Riverego

Venu al MEKARO 2011!	2	Une langue qui compte pour nous	17
Ni estu kreemaj	3	1 000 000 000 en Esperanto	20
ESK : Fiksita en la tempo	6	Kiu inventis la « arabajn » ciferojn ?	22
Lojbano: logika, sed ĉu homa ?	10	La viro, kiu trinkis kurante	27
Leteroj al Avo Frosto	15	Nekrologo: Kajmo forlasis nin	30



**Bonvenon  
al MEKARO  
la longan  
semajnfino  
en majo!**

**Bienvenue à  
MEKARO,  
durant la  
longue fin de  
semaine  
de mai!**

# Venu al MEKARO-2011 en Kingstono, Ontario !

**MEKARO estas la mez-kanada renkontiĝo de esperantistoj, kiu okazas ĉiujare la longan semajnfino en majo en malsama urbo de Ontario aŭ Kebekio (alternante inter la provincoj). MEKARO estas turisma semajnfino en Esperanto por lerni pri la gastiga urbo, gustumi la lokajn frandaĵojn (kaj bierojn), amikiĝi kun aliaj esperantistoj kaj pasigi tempon en bela varma esperantista etoso.**

Ĉi-jare la aranĝo okazos en Kingstono, Ontario, la longan semajnfino en majo (21-23-a de majo). Kingstono estas historia, vizitinda mezgranda urbo, kiu situas mezvoje inter Montrealo kaj Toronto kaj aŭte du horojn sude de Otavo. Kingstono estis la unua ĉefurbo de Kanado, kaj ĝi proponas grandan elekton

de restoracioj, turismaj vidindaĵoj, historiaj muzeoj, kaj pli ! Ni elkore bonvenigas vin viziti nin, dividi viajn spertojn kun aliaj esperantistoj kaj ĝui la etoson de tiu ĉi bela parto de nia granda lando !

Ni havas plenan programon de spertindaj aktivaĵoj, inkluzive la fantoman promenon, esploron de granda fortikaĵo kaj viziton al muzeo en la originala domo de la unua ĉefministro de Kanado, John A. MacDonald. La organizantoj rekomendas kunporti pluvombreton, ĉar la programo okazos, eĉ se

pluvos !

La kotizo estas 50 \$ por plenkreskuloj kaj 30 \$ por infanoj. Ĝi inkluzivas la programon kaj eniron en kvar muzeojn. Pli da informoj kaj aliĝilo haveblas ĉe <http://mekaro.ca>. Ĝis la revido en majo !

[Laŭ mekaro.ca]

← → ↻ mekaro.ca/Mekaro\_2011/Bonvenon.html ☆ 🔍

## 8-A MEZ-KANADA RENKONTIĜO

KINGSTONO, ONTARIO, KANADO, 21-23 MAJO 2011

BONVENON   INFORMOJ   ALIĜILO   BROŜUROJ   ALIĜINTOJ



*Kingstono estas historia, vizitinda, mezgranda urbo, kiu situas mezvoje inter Montrealo kaj Toronto kaj aŭte du horojn sude de Otavo.*

*Ĝi estis la unua ĉefurbo de Kanado, kaj ofertas multajn elektojn por restoracioj, turistaj vidindaĵoj, historiaj muzeoj, kaj pli. Venu ĝui la etoson de tiu ĉi bela parto de nia granda lando.*

*Ni kun varmaj deziroj bonvenas vin viziti nin, kaj dividi viajn spertojn kun aliaj esperantistoj!*

**Bonvenon al la oficiala retejo de MEKARO 2011**

*Gregorio Naçu, la ĉef-organizanto, konstruis belegan retejon por MEKARO : nepre vizitu ĝin, kaj nepre aliĝu !*

# Ni estu kreemaj !

*Jenja Amis*

**Ne estas sekreto diri, ke pluraj Esperanto-grupoj kaj asocioj troviĝas en iaspeca identec-krizo, kie oni devas esti tre kreemaj kaj eltrovi novajn manierojn informadi kaj kreskigi sian membraron en la tempo, kiam oni malpli emas membriĝi en diversaj grupoj kaj asocioj. Tio estas granda defio. Mi tamen pensas, ke ĝuste nun, en la epoko de interreto kaj sociumaj retejoj, ni eble havas la plej grandan ŝancon diskonigi nin al la mondo. Sed kiamaniere tion fari ? Kiel uzi la novajn komunikilojn, kaj ankaŭ kiel allogi la atenton de la tradiciaj amaskomunikiloj por transdoni nian mesaĝon ? Ni iom cerbumis pri tio dum la Decembra Festo 2010 en Montrealo, kaj mi ŝatus resumi la diskuton, aldoni kelkajn miajn pensojn kaj inviti viajn reagojn kaj ideojn.**

La diskuton instigis la letero, kiun la ESK-prezidanto, Normando Fleury, ricevis de japana esperantisto kaj entreprenestro Etsuo Miyoshi. S-ro Miyoshi jam dum naŭ jaroj aperigas reklamojn pri Esperanto en diversaj eŭropaj ĵurnaloj. Li plurfoje aperigis tutpaĝajn anoncojn en la ĵurnalo *Le Monde*. Ĉi-foje, por la Zamenhof-tago 2010, la 15-a de decembro, li aperigis du-paĝan (!) reklamon en *Le Monde*. Antaŭ la publikigo, li sendis la mesaĝon al franclingvanoj

kun la instigo sendi siajn reagojn al la redakcio, tiel ke, vidante la intereson de la legantoj, ĝi traktus Esperanton kiel novaĵon.

La ĝenerala opinio de la ĉeestantoj estis la jenaj : « Por ke la gazetaro parolu pri Esperanto, necesas krei la novaĵon — oni ne parolos pri ni, simple ĉar ni ekzistas... » Iu ŝercis, ke oni eble raportos, se iu loka esperantisto estos mortigita dum iu E-kongreso — oni ja parolis dum semajnoj pri kanada turisto, kiu malaperis en Meksiko ! Sed bone, nun serioze. Kiam mi laboris kiel ĵurnalisto en Ukrainio, la vizitoj de eksterlandaj esperantistoj bone « vendiĝis » al la gazetaro en malpli grandaj urboj ; la vizito de JoMo (Jean-Marc Leclercq — franca



*Dum la Decembra Festo en Montrealo*

esperantisto kaj muzikisto, kiu kantas en pli ol trideko da lingvoj kaj aperis en la Guinness-libro) eĉ altiris la atenton de la televido kaj la granda novaĝ-agentejo ! Mi preskaŭ certas, ke Kanado estas pli saturita de novaĝoj kaj ke estas pli malfacile altiri la atenton de la gazetaro, sed, tamen, mi kredas, ke la situacio ne estas senespera.

La lokaj kaj fakaj komunikiloj kutime estas pli atingeblaj ol la grandaj televidĉenoj aŭ revuoj, kaj, eĉ se ili ne kovras tiom vastan publikon, ofte ĝuste ilia publiko estas proksima al ni laŭ la valoroj kaj pli malfermita al niaj ideoj. Do, se vi aktivas en aliaj movadoj aŭ fakoj (biciklismo, vegetarismo, naturismo, maldekstrismo, literaturo k.t.p.), kontaktu la redakciojn de iliaj fakaj revuoj kaj proponu informojn, novaĝojn kaj / aŭ artikolojn. Alia bona maniero estas kaj restas verki viajn opiniojn kiel reagojn al jam aperintaj artikoloj, kiuj iamaniere koncernas Esperanton, ekzemple, ĉio kio rilatas la lingvojn kaj la lingvoproblemon.



*Oni raportis pri la reeldono de « La Eta Princo » en « Usona Esperantisto »*



*Joel Amis estas intervjuata de Anna, ĵurnalista studentino de UQAM*

Sed ĉu indas entute publikigi multekostajn anoncojn en la ĵurnaloj, kiel *Le Monde* ? Kvankam ĝi certe utilas certgrade, la ĝenerala opinio de la grupo estis, ke la tradiciaj reklamoj, kiom ajn grandaj ili estu, ne vere efikas : ili aperas nur unufoje, nur en la papera formo, kaj kostas multege ; estus multe pli efike investi rekte en la movadajn projektojn. Estas tiom da bonegaj internaciaj kaj lokaj projektoj (Pasporta Servo, Lernu.net, Esperanto.org) — ili estas plejparte volontulaj streboj de dediĉitaj individuoj, kiuj ofte ne ricevas ajnan subtenon por sia laboro. Eĉ etaj monsumoj povas signife helpi tiujn projektojn, kaj pli grandaj kontribuoj (10 000 — 50 000 \$ kaj pli) povas certigi ilian pluekziston kaj evoluon. Laŭ mia scio, Esperantic Studies Foundation estas la sola daŭra monfonto por kelkaj el ili (Lernu, Edukado, NASK), sed la fondaĵo mem perdis multe da mono pro la ekonomia krizo de 2008 kaj eĉ devis ĉesigi kelkajn siajn programojn, kaj ĝi bezonas kontribuojn por povi daŭre financi kaj evoluigi E-projektojn.

Do, kiuj aliaj projektoj estas perspektivaj por la estonteco de nia movado ? Estas multaj. Ekzemple, produktado de profesiaj filmoj pri la lingvo kaj la movado, kreado de profesiaj retejoj, eldonado de vortaroj, organizado de seminarioj kaj aliaj eventoj... Krome, oni konsentis, ke necesas investi en evoluantaj landoj, kie estas multe da intereso pri Esperanto (tutcerte pli ol en Eŭropo, Usono kaj Kanado) kaj homforto por antaŭenigi Esperanton, sed plejparte mankas mono por realigi la ideojn...

Ni nun havas plej multajn eblojn reklami Esperanton aŭ tute senpage, aŭ kun sufiĉe malgrandaj investoj : nome, per la interreto. Kvankam tio estas memevidenta, teni bonan ĝisdatan retejon, kun riĉa enhavo, estas grandega parto de tiu ĉi strebo. Mi ne volas kritiki iun ajn, sed, bedaŭrinde, la kanada E-retejo esperanto.ca ŝajne ne estis ĝisdatigita dum jaroj, kaj se mi estus kanada ĵurnalisto kaj devus verki pri Esperanto, mi eble pensus, ke ĝi ne estas serioza afero se la retejo estas neĝisdata ...

Nia kebekia retpaĝo bone funkcias, sed tamen estas multaj eblecoj plibonigi ĝin. Ekzemple, estus bone fari ĝin pli uzant-amika, por ke pli da homoj povu redakti kaj ĝisdatigi ĝin, krei novajn paĝojn, eventuale blogojn k.t.p. Nuntempe, la ĝisdatigo daŭras

iom tro longe kaj oni devas koni HTML-n por povi redakti ĝin (kun miaj preskaŭ nulaj HTML-konoj nur aldonado de la horaro daŭris du horojn...). Mi pensas, ke aparte gravas aldonado de informoj, pri kiuj povus interesiĝi la gazetaro : tio povas esti artikoloj rilataj al la lingva problemo, blogoj, fotoj, elĉerpaĵoj de muziko, personaj historioj. Kio se ni ankaŭ kreas la paĝon (aŭ apartan retejon, eble eĉ videon !) por nia Avo Frosto ?

Estas certe multaj ideoj por konsideri, kaj mi bone komprenas, ke ofte mankas tempo, mono aŭ scioj por ilin realigi. Sed ni eble tamen provu ?

Ĉu vi konsentas ? Malkonsentas ? Esprimu vian opinion kaj ideojn ! Skribu al riverego(ĉe)esperanto.qc.ca.

***Cetere : la retejo de la revuo Le Monde Diplomatique aperas en 26 lingvoj, inter kiuj estas ankaŭ Esperanto !***

<http://eo.mondediplo.com/>

## **Du pliaj endanĝerigitaj lingvoj**

La lingvoj Koro (parolata en Arunaĉal-Pradeŝo, Hindio) kaj Ĵeĵu (parolata sur Ĵeĵu-insulo, Koreio) estis lastatempe aldonitaj al la reta Atlaso de Endanĝerigitaj Lingvoj de UNESKO. Tiu ĉi novaĵo koincidis kun la nova eldono de tiu ĉi interaga atlaso <http://www.unesco.org/culture/languages-atlas/> Ironie, la atlaso mem haveblas nur en la angla.

# Fiksita en la tempo

Francisko Gauthier



**Ĉu aliĝi al ESK signifas ankaŭ adopti pensmanieron, ĵuri fidelecon al iu tradicio aŭ esti baptita en sankta kirko ? Ŝajnas ke ESK kaptitas en ensorĉita cirklo de stagna membraro, kiu favoras siajn malnovajn kutimojn, ĝenante la novulojn.**

Mi apenaŭ surpriziĝis kiam, organizante MEKAROn en Tririvero, la estraro esprimis sian malkontentecon vidi en la programo tempon por debatoj. Mi neniam provis imponi al iu ajn tra mia agado en ESK, sed ĉiam ŝajnis al mi, ke mankas spaco por valorigi, kio novas, kio potencia-las. ESK havis multe da sukcesoj, disvolvis multe da agmanieroj, kaj nun ? Novuloj frontas stagnantan cirklon de spertaj esperantistoj, kun kiuj preskaŭ maleblas debati pri io ajn. Sed la ŝanĝoj ne fariĝas per malnovaj ideoj ! Bedaŭrinde, en ESK oni preskaŭ ne konsideras novajn ideojn kiel atentindajn.

Kiam mi provis paroli pri riismo dum la lasta MEKARO por scii, kion homoj pensas pri tio, oni respon-

dis al mi, ke tio estas malkorekta pensmaniero, ke mi devas konformiĝi al la oficialaj reguloj kaj ke mi ne rajtas perturbi la lingvajn konvenciojn. Kiam mi metis demandojn pri la ciumado en *La Riverego* n-ro101, oni unue respondis al mi, ke « ne eblas » ciumi en Esperanto. Kiam mi demandis al homoj, ĉu ili deziras kunporti ideojn kaj kritikojn pri la evoluo de la MEKAROj, ili respondis unuvoĉe : « Ne, ili estas per-fek-taj! ». Kiam mi demandis taksu ilin je dekskalo, oni diris al mi, ke certe la nuna formulo valoras dek ! Nenio dirindas ! Kiam mi skribis pri la decido de UEA, ke ĉiuj Esperantistoj subtenu UN, oni demandis min submeti mian tekston al Normando, timante ke ĝi estas *tro politika!*

**Bedaŭrinde, en ESK oni preskaŭ ne konsideras novajn ideojn kiel atentindajn.**

Nu, ESK devas vekigi. Subteni Esperanton, por ĉiuj, signifas mergiĝi en intensajn debatojn kaj trakti kun polemiko ĉiujn tagojn de sia vivo. Tio signifas ankaŭ fidi je homoj, kiuj akceptas diskuti surbaze de reciproka logikeco kaj rekoni, kiamaniere kelkaj sukcesas eskapi realon per sidiĝo sur malnovaj antaŭjuĝoj kaj dekretoj. Kiam oni kvazaŭ rekonas tiujn homojn en la membraro de ESK, sendube oni ne pensos, ke tiu organizaĵo povas realigi niajn ideojn kaj ambiciojn. Tial mi deziras malaliĝi de ESK. Dankon al ĉiuj tiuj, kiuj diskutis kun mi, disvolvis siajn opiniojn, konsideris min kiel inteligentan personon, kun kiu indas debati.

# Respondetoj al Francisko Gauthier

*Silvano Auclair*

**Nu, mi devas komenci dirante, ke mi bedaŭras pri via decido forlasi la movadon, en kiu ĉies fortoj kaj opinioj bonvenas, kvankam vi sentis male. Sed, ĉar vi publike faris kelkajn komentojn, permesu al mi publike reagi al iuj el ili.**

## Lingvaj komentoj

Vi ŝajnas bedaŭri, ke ESKanoj ne aprobas la riismon kaj ke mankas en Esperanto ĝenerale akceptita maniero cidi. Nu, kion ni povas fari pri tio? Esperanto jam estas preskaŭ 125-jaraĝa, kaj ne eblas ŝanĝi la lingvon, eĉ se pluraj konsideras iujn ŝanĝojn dezirindaj. Nu, Esperanto jes spegulas la socion, en kiu ĝi naskiĝis kaj kreskis kaj plu vivas, kaj ĝi ja evoluis en tre « ĝentila » socio. Ĉu vi ĉesos uzi la francan, ĉar mankas neŭtra pronomo apud *il* kaj *elle*? Ĉu usonanoj ĉesos paroli la anglan, ĉar ne eblas ciumi en tiu lingvo? Kial agi malsame kun Esperanto? Kial Esperanto devus esti *perfekta* lingvo?

Cetere, ĉu iu *malpermesis* al vi ciumi aŭ riumi? Faru kiel vi volas, sed nur estu konscia, ke temas pri minoritataj uzoj, kiujn pluraj trovas neĝustaj, kaj ke pluraj esperantistoj timas ĉion, kio povus disdialektigi la lingvon. Esperantistoj estas liberaj uzi la lingvon kiel ili deziras, sed ankaŭ liberaj konsideri neFundamentajn uzojn kiel malbonajn.

Tamen, mi esperas, ke vi ne foriras, ĉar miaj lingvaj komentoj en *La Riverego* simple spegulas la ĝeneralan opinion pri la pritraktitaj temoj. Ne forgesu, ke lingvaj korektistoj emas al konservemo; tio estas parto de la laboro. En veturilo bremsoj utilas, ne nur motoro... Sen ili veturisto baldaŭ mortus.

**Ĉu usonanoj ĉesos paroli la anglan, ĉar ne eblas ciumi en tiu lingvo? Kial agi malsame kun Esperanto? Kial Esperanto devus esti *perfekta* lingvo?**

## Movadaj komentoj

Same kiel neniu povas postuli, ke aliaj konsentu pri *apartaj* lingvaj opinioj, neniu povas peti, ke oni konsentu pri movadaj opinioj. Nu, granda parto de movada laboro estas teda; cetere same estas en pli-malpli ĉiu laboro. Organizis semajnfinojn aŭ paĝaranĝojn revuon postulas grandan laboron kun eble magra rezulto.

Almenaŭ kun ne mondkua rezulto. Kaj vi ne forgesu kelkajn aferojn :

- La esperantistoj kutimas al la Esperantaj aranĝoj, kaj sufiĉe kontentas pri ili por ĉeesti ilin. Se homoj tute ne ŝatus la enhavon aŭ la etoson de MEKAROj, ili verŝjane ne ĉeestus ilin, kaj sekve ne povus respondi al viaj demandoj dum via aranĝo en Tririvero...
- La ĝenerala publiko tute ne zorgas pri ni, pri Esperanto aŭ pri la monda lingva problemo. They speak English and that's all. Eble tial ni pli kaj pli direktas niajn fortojn al internaj eventoj, sed tamen ĉiam kontentas kiam strangulo kiel ni eniras la movadon.
- Vi eble trovas enuaj la pli aĝajn esperantistojn

(kaj ĝenerale junuloj trovas enuaj la malplijunulojn), sed vi ankaŭ devas konscii, ke ni ankaŭ estis junaj kaj entuziasmaj, ke ni volis ŝanĝi la mondon, ke ni aktivis en multaj rondoj kaj ke ni koliziis kontraŭ multaj muroj. Ili eble iomete moviĝis, sed muroj estas pezaj kaj solidaj. Neintereso certe estas la plej peza el ili. Eble tiel ni ofte respondos al novaj projektoj, ke ĝi ne estas nova, ke ni jam provis ion treege similan, kun treege magra rezulto. Ni devas trovi novajn manierojn agadi, kaj estas klare, ke tiuj manieroj nepre venos el junuloj. Junuloj kiel vi, kun novaj ideoj kaj novaj fortoj. Tiaj junuloj tamen devos atendi multajn *saĝajn* rifuzojn niaflanke, sed tio devas nur pliantaŭenigi la pensadon kaj la agadon.

---

## Letero al Francisko Gauthier

*Kara Francisko,*

*Post la legado de via artikolo, mi komprenas vian malbonhumoron rilate nian kebekian movadon. Sed mi vidas vin kiel homon, kun kiu valoras la penon diskuti. Vi faris gigantan kaj bonegan laboron por nia lastjara MEKARO, kiel cetere mi mesaĝis al vi tuj post la aranĝo. Vi estas valora esperantisto.*



*Mi ŝatus mallonge komenti pri la diversaj punktoj, kiujn vi mencias en via artikolo, ne por rebati, sed por komuniki al vi mian senton pri ili.*

*Unue, mi bedaŭras, ke oni rifuzis enmeti tempon por debatoj en la MEKARO-programon. Mi neniam aŭdis pri tio kaj ne konas la kialon de tiu rifuzo. Mi ne scias, kiel vi*



prezentis vian ideon, sed, en si mem, ĝi ŝajnas al mi tute bona, kaj mi certe partoprenus tiujn debatojn, se ili okazus.

Mi ne memoras la diskuton pri ri. Sed temas pri ja interesa, debatinda demando. Pensu tamen, ke aŭtomate rifuzi novaĵon aŭ ŝanĝoproponon estas tute homa reago. Por enkonduki ŝanĝon, eĉ en la plej progresemaj movadoj fakte, necesas multege da pacienco, laboro, tempo. « Ne en unu tago elkreskis Kartago »... Insistu, daŭre insistu, por diskuti pri la temoj gravaj por vi. Verku, propagandu, persistu. Vi havos ĉiam almenaŭ unu kundiskutanton aŭ leganton: min — sed certe ankaŭ aliajn.

Pri ciumado, same : interesa, diskutinda demando. Kaj fakte, kiel mi skribis en la antaŭlasta numero de La Riverego (n-ro 101) estas Esperantaj medioj, en kiuj oni ja ciumas. Sed mi bedaŭrus, se vi vidus mian artikolon pri ciumado kiel fermitan pordon kontraŭ plua diskutado. Male, mi pretas diskuti pri tio iam ajn.

Ŝajnas al mi, ke via ideo taksu la MEKARO-kunvenojn ne estis komprenita, simple ĉar la partoprenantoj

plejparte kontentas pri ili. Mi ne memoras, sed ĉu vi diris, ke vi mem malkontentas pri ili kaj ŝatus proponi ŝanĝojn ? Insistu, Francisko, diru vian opinion. Se tio ne sukcesas en grupa kunteksto, alparolu unuopulojn,

unu post la alia. Eble vi trovos pli da simpatiantoj, ol vi pensas !

En via artikolo pri UN vi esprimis sufiĉe radikalan opinion. Ne estu surprizita, ke kelkaj homoj iom ŝokiĝis. Laŭ mi, tamen, indas publikigi tiajn artikolojn, ĉar ili povas levi gravan kaj valoran debaton pri politika kaj socia agado, institucioj, etiko, ktp. Eble, por ekigi la debaton, mi devus skribi, en la venonta

Riverego, reagon al via UN-artikolo...

Francisko, mi invitas vin daŭre esprimi ideojn — almenaŭ en La Riverego, se vi deziras ne plu partopreni en niaj esperantistaj kunvenoj. Estos ĝojo por mi, kaj certe ankaŭ por aliaj, plu debati pri ĉiuj tiuj temoj, kaj pri aliaj, kiujn vi proponus al ni.

Francisko Lorrain

**Por enkonduki ŝanĝon, eĉ en la plej progresemaj movadoj fakte, necesas multege da pacienco, laboro, tempo. « Ne en unu tago elkreskis Kartago »... Insistu, daŭre insistu, por diskuti pri la temoj gravaj por vi.**

# Lingvo logika, sed ĉu homa ?

Silvano La Lacerto Auclair



*Dans son tour des langues construites, notre lézard s'attarde aujourd'hui à une langue basée sur la logique.*

**Esperantistoj tre fieras pri la logikeco de sia lingvo. Estas vere, ke multaj strangaĵoj de naciaj lingvoj estis elĵetitaj el Esperanto kaj ke logiko estas unu el la principoj de la lingvo. Sed logiko ne estas LA bazo de Esperanto, ĉu ?**

Ekzemple, ni konsideru la jenajn asertojn :

*Petro amas Marian.*

*Petro estas pli alta ol Maria.*

*Petro estas la edzo de Maria.*

Tiuj tri frazoj priskribas rilaton inter Petro kaj Maria. Tamen, ili uzas tri malsamajn gramatikajn strukturojn : verbon kaj akuzativon ; adjektivon kun indikoj de komparo ; predikativon kaj prepozicion. Kial tri malsamaj strukturoj por indiki simplan rilaton ? Kial tiu mallogikeco ?

Ekzistaj artefaritaj lingvoj, en kiuj logiko regas, en kiuj ĝi fundamentas. La plej evoluinta el tiuj certe estas *lojban* (prononcu: loĵban). Ĝia nomo eĉ signifas *logika lingvo*. Nu...

Kiel traduki niajn tri frazojn en loĵbanon ?

*la petr. prami la marias.*

*la petr. rajyclamau la marias.*

*la petr. speni la marias.*

Tri tute samstrukturaj frazoj.

## Kelkaj principoj de Loĵbano

Loĵbano apogas sin sur kelkaj principoj, kiuj unuaviĝe similas al tiuj de Esperanto, sed kiujn Loĵbanistoj ŝovis multege pli antaŭen. *Logiko* reĝas, kaj frazoj baze konsistas el rilatesprimoj inter diversaj elementoj. La radikoj estis *neŭtrale* elektitaj, laŭ klaraj reguloj. La vortfarado estas *strikte regula*, kaj frazoj povas havi nur unu signifon. Estas ekzakta rilato inter la *skribo* kaj la *elparolo*.

## Logiko

Logikon oni ĉi tie komprenu kiel la tradician Aristotelan logikon, uzatan en matematiko kaj en komputiloj, en kiuj oni asertas verajn aŭ falsajn rilatojn inter du aŭ pluraj elementoj, kiel  $2 + 2 = 4$ . Ekzemple,

la vorto (kompreneble, la gramatiko de Loĵbano uzas tute apartajn vortojn ; ĉi tie, oni dirus *brivla) prami* priskribas amrilaton inter du parametroj, la amanto kaj la amato. Nur la loko distingas la amanton de la amato; tamen, ekzistas diversaj, sed klaraj manieroj ŝanĝi tiun ordon. Ekz. : *la marias. se prami la peter.*

Tiu emo al rilat-esprimoj kaŭzas, ke eĉ la vorto *badna* (ĝi signifas banano, kaj mi ekkonis ĝin, ĉar ĝi estas la unua en la alfabeto ordo) signifas: « X1 estas banano laŭ kultivvario X2. » Aliaj vortoj ligas ĝis kvin elementojn, kiel *klama*, kiu signifas : « X1 iras/veturas al celo X2 el deirpunkto X3 laŭ vojo X4 per maniero/veturilo X5 ». *Mi iras de Montrealo al Kebeko per trajno* tradukiĝas al : *Mi klama la montreAl. la kebEk fu le trene.* La vorteto (en Loĵbano : *cmavo* [ŝmavo]) *fu* indikas la kvinan komplementon ; sen ĝi, mi irus al Kebeko *laŭ* la trajno, ne *per* ĝi. (Imagu : la indikiloj de la aliaj komplementoj estas *fa, fe, fi* kaj *fo...*)

La ordon de la subjektoj/komplementoj de ĉiuj 1350 radikoj **oni devas lerni parkere**. Ne estas prepozicioj por helpi vin. Kaj krome ekzistas reguloj por trovi la ordon de la subjektoj/komplementoj de kunmetitaj vortoj, kiel *rajyclamau*, kiu analiziĝas kiel *vertikale pli longa*, kaj sekve estas la kunmeto de **tri** radikoj.

Tiu obeemo al logiko havas ankaŭ sekvojn en aliaj kampoj. La artikolo *le* pli malpli signifas *la*, sed fakte

signifas « tiu(j), kiu(j) laŭ mi estas ». Alia artikolo signifas « ĉiuj el tiuj, kiuj vere estas ». Sekve, *ci le gerku* signifas *tri el la hundoj* ; *le ci gerku, la tri hundoj* ; *ci lo gerku, tri hundoj*. (La vorteto *la* simple sed devige enkondukas proprajn nomojn — kiuj nepre devas finiĝi per konsonanto.) Oni ankaŭ uzas aliajn artikolojn por grupo, por aludi kutimecon (leonoj loĝas en Afriko, kvankam estas kelkaj en Granby...), k.t.p.

Ankaŭ posedesprimoj estas diversaj. Logika lingvo devas uzi malsamajn esprimojn por distingi inter *mia brako* (kiu estas — espereble — nedisigebla parto de mia korpo), *mia biciklo* (kiun mi aĉetis), *mia seĝo* (en la klubejo, ekzemple : mi ne posedas, sed simple uzas ĝin) kaj *mia filo* (kiun mi ne posedas, sed... patras).

Krome, la klareco postulata de logiko ankaŭ malpermesos, ekzemple, la uzon de frazo kiel *mi atendas vin* : en Loĵbano, oni ne atendas homon aŭ objekton, sed nur eventon. Sekve, oni devas atendi *la venon de iu...*

## Neŭtralaj radikoj

Por plifaciligi la kunmeton de radikoj kaj la rekoneblecon de la vortoj, la kreintoj de Loĵbano decidis, ke ĉiuj bazaj radikoj havu kvin literojn kun du sinsekvaj konsonantoj. Ili tiel ĉiuj sekvas la formojn *klama* aŭ *badna*. Eĉ la radiko por « esti la patrino de » estas *mamta* !

Tamen, radikoj ne estis kreitaj el nenio : ili ĉiuj venas el la kvin plej parolataj lingvoj de la mondo (la ĉina, la hindia, la angla, la hispana, la rusa kaj la araba : ili estas ses, ĉar la tenanto de la kvina loko ŝanĝiĝis dum la vortkreado) laŭ matematika formulo konsideranta ĉiun lingvon laŭ la nombro da parolantoj. La rezulto estas... volapukeca. Oni povas rekoni iujn vortojn (*rupnu* signifas monunuoj kaj eblas vidi en ĝi la vortojn *rupio* kaj *rublo*), sed malmultajn, krom, eble, nomojn de gento, kaj eĉ tiuj ne ĉiam facile rekoneblas ! Franca/o estas *fraso*, *glico* estas angla/o, *ropno*, eŭropa/ano (sekve, eŭro estas *ropno rupnu...*). Sud-amerika/ano estas *ketco* (laŭ la keĉua lingvo, tiu de la Inkaoj) kaj, forgesinte neniun kontinenton, oni elektis *dzipo* por Antarkta... Notu, ke mi devis ĉiam diri franca/o k.s., ĉar la Lojbanaj radikoj indikas nur la francecon aŭ la antarktecon, sed nek Franco, nek Franca : oni devas diri *fraso bangu* (aŭ *fasbau*) por franca lingvo, *glico gugde* (aŭ *gligu'e*) por Angla lando, aŭ *dzipo tcima* [ĉima] (aŭ *dziti'a*) por antarkta klimato...

Nu, por lerni Lojbanon, mi jam diris, ke necesas lerni 1350 radikojn kun la priskribo de iliaj komplementoj ; mi aldonis, ke tiuj 1350 radikoj apenaŭ estos rekoneblaj. Estas pli. Por krei kunmetaĵojn, la unua

**La radikoj ne estis kreitaj el nenio : ili venas el la kvin plej parolataj lingvoj laŭ matematika formulo konsideranta ĉiun lingvon laŭ la nombro da parolantoj. La rezulto estas... volapukeca.**

vorto povas simple ellasi sian finan literon — simple. Tiel, « franca lingvo » povas esti *frasbangu*. (Por eviti malfacilajn aŭ malpermesitajn litersekvojn, eblas aldoni *y*, kiu prononciĝas kiel la franca *e* : bona ideo, kiu evitas vortojn kiel *littuko* !) Sed plej multaj ofte kunmetitaj radikoj havas unu, du aŭ eĉ tri trilaterajn mallongajn formojn. La vorto *tsani*, ĉielo, havas la mallongan formon *tan* ; *kelci*, ludi/o, havas la mallongajn formojn *kel* kaj *kei* ; *bloti*, boato, havas la mallongajn formojn *lot*, *blo* kaj *lo'i*... (Noto : la ' prononciĝas kiel h.)

Eĉ *cmavo* (mallongaj gramatikaj vortoj) povas havi kunmetblajn formojn. Ekzemple, *re* signifas *du* kaj havas la trilateran formon *rel* : povas esti en Lojbanon neniun konfuzon inter *dumonataj revuoj* kaj *du monataj revuoj*. Fakte, povas esti en Lojbanon neniun konfuzon, oni certigas tion.

## Amuzaj radikoj kaj kunmetaĵoj

Lojbanistoj tre detale pristudis la signifon de vortoj kaj radikoj, kun la celo krei kiel eble plej multajn vortojn el kiel eble plej malmultaj radikoj. Tio foje kondukas al pensigaj elektoj. Ekzemple, estas nur unu radikoj por kubuto kaj genuo, *cidni*. Eĉ pli

amuze : nur unu vorto por peniso kaj klitorio, *pinji*. Uzu kunmetaĵojn por pli da precizo, se indas.

Simile, la vorto por reĝo estas *nolrajtru*, kiu analiziĝas kiel *plej nobla reganto*. Oni devas uzi kunmetaĵon por kalkano, kiu pli-malpli tradukiĝas per malantaŭo de piedo. Oni uzas la saman vorton por prezidento, kapitano, estro k.t.p.

Simila ekvilibro inter precizeco kaj malprecizeco estas la konjugacio de la verboj. Nu, fakte, ne estas konjugacio. Ne ekzistas en Loĵbano io kiel finaĵoj. Por indiki prezencon, oni devas aldoni la *cmavo* « ca » antaŭ la verbon ; por pasinteco, la *cmavo* « pu ». Por pluskvamperfekto, oni uzos *pupu...* Estas aliaj *cmavo* por signi finitecon, aŭ por situigi tutan rakonton en la pasinteco, k.t.p. Sed tute eblas eldiri frazon **sen iu ajn indiko** pri tempo. La frazo *mi prami do* ne signifas *mi amas vin, sed mi amas/is/os/us vin*, eventuale pli klare kun aliaj tempindikoj. Ekzemple, eblas diri : *mi pramo do ca le cabdei* – mi amas vin hodiaŭ (fakte : *dum la nuntago, la brivla* « prami » havante neniun *lok*on por indiko de tempo).

## Rilato skribo / parolo

Esperantistoj fiere anoncas sian lingvon kiel foneti-



Flago de Loĵbano (Vikipedio)

kan. Krom kelkaj disputoj ĉirkaŭ literoj kiel c (= ts), tio estas pli-malpli vera. Sed, kiel ĉiam, Loĵbano puŝis la aferon pli antaŭen.

Kiel vi pronocas komon aŭ punkton ? Neniel ? Sekve, Loĵbano havas neniun interpunkcion. (Komoj uziĝas por disigi vokalojn, kaj punktoj – por signi halton ĉe vortoj komenciĝantaj per vokalo aŭ finiĝantaj per konsonanto...) Por signi interfrazon, oni uzas la vorteton *.i*. Por paragrafoj, *ni'o...*

Ĉu vi elparolas majusklojn malsame de minuskloj ? Ne ? Sekve, Loĵbano ne uzas majusklojn, krom por signi la akcenton en propraj nomoj aŭ en ĥemiaj formuloj.

Se vi legas la nombron 13, vi diras dektri, kvankam vi vidas unu-tri, ĉu ne ? Sekve, Loĵbanistoj simple diros *lipaci* : nombro unu tri. Simple ! Eĉ kvarjara infano povos legi Loĵbanajn nombrojn, eĉ se li aŭ ŝi tute ne komprenas la nombrosistemon...

## Trooj kaj mankoj

Tre ofte, Loĵbano troigas logikon kaj precizecon. Se via najbaro al vi diras, ke li lavis sian aŭton, vi eble respondos : « Nu, ankaŭ mi faros. » Ne se vi parolas Loĵbanon, ĉar tio signifus, ke vi lavos la aŭton... de

la najbaro. Sekve, enkondukiĝis alia vorto por diri la normalan, reciprokan, aferon.

Simile, Loĵbano distingas inter pluraj formoj de kaŭzo ; ĝi devigas precize signi, kion aŭ kiun vi aludas, kiam vi uzas pronomon ; ĝi tre klare prezentas ĉian matematikan esprimon ; ĝi postulas, ke vi diru *coi*, kiam vi renkontas iun, kaj *co'o*, kiam vi adiaŭas ; por pretera saluto, uzu *coico'o* [ŝojŝoho] ; ĝi uzas tre malfacilan aron da vortoj por anstataŭigi *kaj*, *aŭ* aŭ *se*, k.t.p. (Komputilistoj komprenos.)

Plej amuze estas la longa aro da vortoj por signi emociojn. Loĵbano tre, tre multe preterpasas la simplajn *Oj!* *Aĥ!* kaj *Fi!* de Esperanto. Ekzemple, *.ue* esprimas surprizon, *.uenai*, mankon de surprizo ; *.e'u*, la proponon, kiel *bonvole*. La sistemo estas preskaŭ pli komplika ol tuta Esperanto, kaj ebligas esprimi ĉian emocijon, kun gradoj, kampoj k.t.p.

Tamen mankas diversaj aferoj. Ĉar ne eblas neŭtrale kaj logike nomi la tagojn kaj la monatojn, oni simple numerigas ilin — sed restas la demando, ĉu dimanĉo aŭ lundo estas la unua tago de la semajno. Uzo de mezuro estas ne evidenta : se mi volas diri, ke mi altas 1,75 m, mi devas pli-malpli diri, ke mi metras 1,75 : *la silvAn mitre li papizemu*. La vorto por metro estas *mitre* ; kunmetaĵoj sekvas la Loĵbanajn regulojn. Sekve, kilometro estos *kilto mitre*, *kiltymitre* aŭ *ki'otre*... Nu, ankaŭ en Loĵbanon ne eblas fa-

cile enigi internaciajn vortojn.

Sed la plej grava afero verŝajne estas, ke preskaŭ ne niu kapablas paroli Loĵbane pli ol kelkajn minutojn. Mi jam iom provis deĉifri Loĵbanajn frazojn skribe, kaj mi apenaŭ sukcesis, eĉ kun ĉiaj listoj da vortoj kaj multe da tempo kaj eĉ se frazo povas analiziĝi en nur unu maniero. Ĉar Loĵbano baze kreiĝis por testi, ĉu homoj povas paroli logikan lingvon, ŝajnas, ke ĝi atingis nean respondon...

## Patro Nia en Loĵbano

*doi cevrirni .iu noi zvati le do cevzda do'u*  
(doj ŝevrirni ju noj zvati le do ŝevzda dohu)  
*fu'e .aicai .e'ecai lo do cmene ru'i censa*  
(fuhe ajŝaj eheŝaj lo do ŝmene ruhi ĉensa)  
*.i le do nobli turni be la ter. ku se cfari*  
(i le do nobli turni be la ter ke se ŝfari)  
*.i loi do se djica ba snada mulno vi'e le cevzda .e .a'o la ter.*  
(i loj do se ĝiŝa ba snada mulno vihe le ŝevzda e aho la ter)  
*.i fu'e .e'o ko dunda ca le cabdei le ri nanba mi'a*  
(i fuhe eho ko dunda ŝa le ŝabdej le ri nanba miha)  
*.i ko fraxu mi loi ri zu'o palci*  
(i ko fraĥu mi loj ri zuho palŝi)  
*.ijo mi fraxu roda poi pacyzu'e xrani mi*  
(iĵo mi fraĥu roda poj paŝazuhe ĥrani mi)  
*.i ko lidne mi fa'anai loi pacyxlu*  
(i ko lidne mi fahanaj loj paŝaĥlu)  
*.i ko sepri'a mi loi palci*  
(i ko sepriha mi loj palŝi)

# Avo Frosto respondas en Esperanto !

**Une fois de plus, en décembre dernier, le Père Noël a répondu aux enfants qui lui ont écrit en espéranto. Habituellement, près de 50 lettres de plus de dix pays arrivent avec la mention Avo Frosto. Cette année, seulement 22 lettres de quatre pays (Canada, Roumanie, Tchéquie et Suisse) sont arrivées.**

**Denove en decembro 2010, Avo Frosto respondis al la infanoj, kiuj skribis al li en Esperanto. Venis malpli da leteroj ol dum la pasintaj jaroj, do entute 22 (unu el Kanado, du el Rumanio, sep el Ĉeĥio kaj dekdu el Svisio).**

Tamen, kelkaj leteroj estis amuzaj, kaj infanoj bone skribis en Esperanto. Ekzemple, unu infano petis *iPod Shuffle Touch 8G-n*, sed aldonis, ke se Avo Frosto ne povas doni tion, ne gravas. Alia infano skribis : « Mi ŝatus ion por mi, sed ne gravas, kio ĝi estas. » Ne ĉiuj infanoj tamen estas tiom ne precizaj. Jen ekzemplo : « Mi volas memorkarton por mia poŝtelefono aŭ mi volas Nintendon. » (Mi ne komprenas, pri kiu « tendo » temas, ĉar la vorto « nino » ne troviĝas en PIV !) Bele estas ankaŭ, kiam infano dankas sen peti ion : « Mi dankas vin pro ĉiuj donacoj, kiujn vi donis al mi, kaj ĉiuj aliaj aferoj. »



En la pasintaj jaroj estis kortuŝe, kiam plenkreskulo skribis nome de infano, kiu estas tre malsana, kaj petis, ke Avo Frosto sendu kuraĝon al ŝi. Fakte ofte granduloj skribas pri diversaj temoj : jen ke ili ŝatus vojaĝi al Kanado, jen pri siaj infanoj, kiuj ne vizitas ilin, aŭ simple por ekscii, ĉu ili vere ricevos respondon en Esperanto.

Mi finu per citaĵo el letero de 18-jara (jes, 18-jaraĝa !) infano, kiu estas malsaĝa kaj kiu lernis Esperanton por paroli al « nekonatoj » (verŝajne, ŝi celis diri « fremdulojn », ĉar kutime gepatroj atentigas infanojn ne paroli al nekonatoj). Ŝi petis, ke ĉiuj malsaĝaj infanoj, kiel ŝi, ricevu ludilojn.

Bonan ne-tro-frostan jaron !

*Avo Frosto*

# Batalo de Vikipedioj

*Silvano Auclair*

**Antaŭ kelkaj jaroj, mi miris en *La Riverego*, ke la Volapuka Vikipedio sumas pli da artikoloj ol la Esperanta. Mi ankaŭ prezentis konkludon de rapida esploro de la Volapuka Vikipedio, kiu plenis je tre mallongaj artikoloj, multaj el kiuj temis pri urboj, amuze nur el malmultaj landoj. Tiuj artikoloj aspektis al mi maŝintradukitaj.**

Hodiaŭ jen du bonaj novaĵoj : ne nur Esperanto denove antaŭas, en la 22-a loko, kun iom pli ol 140 000 artikoloj (Volapük estas la 27-a, kun iom malpli ol 120 000 artikoloj), sed mi malkovris, ke ekzistas mezuro pri la **graveco** de artikoloj laŭ samplo de teme gravaj artikoloj. Laŭ tiu mezuro, la plej evoluinta vikipedio estas tiu en la... kataluna (kvankam ĝi rangas en la 14-a loko laŭ la simpla kalkulo de la artikoloj), kun noto je 90,17 %. La angla estas la dua, kun 86,48 % ; Esperanto, la 32-a, kun nur 23,81 %, kaj Volapük... la 132-a, kun mizera noto je 2,98 %...

[http://meta.wikimedia.org/wiki/List\\_of\\_Wikipedias\\_by\\_sample\\_of\\_articles](http://meta.wikimedia.org/wiki/List_of_Wikipedias_by_sample_of_articles)

## Kiel Avo Frosto komencis respondi leterojn ?

En 1974 la dungitoj de la Kanada Poŝto notis plurajn leterojn, adresitajn al Avo Frosto, kaj por ne ĉagrenigi infanojn, ili komencis respondi ilin. La kvanto de la poŝtaĵoj adresitaj al Avo Frosto pligrandiĝis ĉiujare, kaj en 1983 la poŝto anoncis la specialan ~~volontulan~~ *elfan* programon por respondi la leterojn. La kvanto da leteroj atingis unu milionon en 2007, kaj kun la kvanto da leteroj grandiĝis ankaŭ la kvanto da korespond-lingvoj (pli ol dudeko nun, inkluzive la brajlan !). La programo fariĝis tiel populara, ke ĝi eniris la Guinness-libron de rekordoj ! Avo Frosto respondas en Esperanto ekde 2002. [Laŭ *Vikipedio kaj la retejo de la Kanada Poŝto – Red.*]







## L'espéranto, une langue qui compte pour nous

Silvano Auclair

**À première vue, le système de numération de l'espéranto semble simple ; malgré tout, on retrouve de nombreuses erreurs dans l'usage qu'on en fait.**

Je n'ai sûrement pas besoin de vous rappeler les noms des nombres : *unu, du, tri...* Cependant, il semblerait que la règle gouvernant les nombres composés ne soit pas si claire. Elle est pourtant simple : *La dekoj kaj centoj estas formataj per simpla kunigo de la numeraloj* — les seuls nombres composés sont les dizaines et les centaines. Alors, *vingt* devient *dudek* (avec l'accent sur *du*, bien entendu), *quatre-cents* devient *kvarcent* et *neuf-cent-vingt-trois* se traduit par *naŭcent dudek tri*, en trois mots et sans le moindre trait d'union. Et rappelons que seules les centaines et les dizaines sont ainsi soudées : *ni estas en la jaro du mil dek unu*.

Le plus grand numéral, tant en français qu'en espéranto, est 999 999. Passé cela, on arrive à un million, mais le mot *million* n'est pas un numéral : c'est un nom tout à fait ordinaire, comme *douzaine* ou *litre*. De la même manière qu'on dit une douzaine d'œufs ou un litre de lait, on dira... *unu miliono da dolaroj*.

Ah ! Ce fameux *da* ! Beaucoup de francophones ont de la difficulté avec cette préposition, la confondant avec *de* (qui a pourtant bien assez de fonctions comme cela). C'est assez simple, pourtant : on utilise *da* pour relier une expression exprimant une **quantité** à la **chose** qui est ainsi quantifiée ou mesurée. Par exemple, *taso da lakto, glaso da vino, deko da homoj, miliono da eŭroj, multe da problemoj*. Par ailleurs, *glaso de vino*, c'est un type de verre, un verre **à vin**.

### Autre détails

Pour les grands nombres, l'espéranto fonctionne comme la plupart des langues, mais pas comme l'anglais ou le russe. Mille millions, en espéranto comme en français, ça fait un milliard, *unu miliardo*. En anglais, on dirait *one billion*. Mille milliards, ça fait un billion, *unu biliono* ; en anglais, c'est *one trillion*. Il existe des noms pour les nombres plus grands — après tout, la liste des nombres n'a pas de fin —, mais à peu près seuls les scientifiques ont besoin de telles grandeurs et ils utilisent davantage la notation exponentielle, du genre  $10^{12}$ .

Après *da*, comme après la plupart des prépositions, on n'utilisera jamais l'accusatif ; c'est l'expression de la quantité qui prendra la forme que nécessite sa fonction dans la phrase. Cependant, avec *multe da*, une phrase peut rester imprécise : *multe da cervoj*

*manĝis multe da lupoj* — on ne sait pas trop qui a mangé qui, sans l'accusatif. Mieux vaut donc utiliser *multa(j)(n)*.

On rencontre, en espéranto comme en français, un problème quand un nombre s'exprime avec à la fois un mot comme *million* et des vrais numéraux, comme lorsqu'on dit *un million cent mille personnes*. Bien qu'on puisse souvent s'en tirer en disant plutôt *un virgule un million de personnes*, il est possible en espéranto de dire *unu miliono kaj cent mil da personoj*. Après tout, on a ici aussi l'expression d'une quantité et une chose quantifiée, n'est-ce pas ?

## Nombra vortareto

**Cifero** – signo, uzata por skribi nombrojn : 1, 2, 3 k.t.p. (*kvincifera nombro, romanaj / arabaj / hindaj ciferoj*); evitu uzi la vorton « cifero » por « kvanto » aŭ sumo

**Kvanto** – 1) pli aŭ malpli granda mezuro aŭ nombro de objektoj aŭ personoj (*kvanto da libera tempo – Z*); 2) granda aŭ nombro

**Nombro** – 1) elemento de unu el la nombrosistemoj (entjera, reela aŭ kompleksa); 2) nombro, uzata por mencii kvanton (*ni estis nur en la nombro de okdek – Z*)

**Numero** – cifero aŭ numeralo, montranta la vicon de iu objekto inter aliaj (*numero de paĝo*); la objekto mem, signita per iu numero (*numero de revuo*). Atenton ! La angla vorto « number » povas tradukiĝi kaj kiel « numero », kaj kiel « nombro » !

**Numeralo** – vortospeco uzata por indiki precizan kvanton aŭ kvantan rilaton (la bazaj numeraloj : unu, du, tri... ; la ordaj numeraloj : unua, dua...); 2) (komputila) prezentaĵo de nombro per ciferoj kaj eventuale interpunkcio.

## De unu ĝis naŭ


*Olga du Temple*

**Ĉu vi iam pripensis, kial 1 estas unu, 2 estas du, 3 estas tri k.t.p.? Kion ni scias pri la deveno de ciferoj, kiujn ni uzas ĉiutage, kaj kiujn niaj posteuloj uzos verŝajne ĝis la fino de la mondo ? Se via respondo al la unua demando estas « ne », eble vi trovos la sekvantajn paragrafojn interesaj.**

Laŭ mia scio, kapablo kalkuli estas la sola eco, kiu distingas nin de aliaj animaloj. Estas preskaŭ certe, ke en la komenco de kalkulado estis streko. Tiu ĉi simpla kalkulmarko estas ĝis nun uzata, ekzemple, de enkarceritoj – oni povas vidi tion sur la ĉelaj muroj (« Kiom da tagoj mi jam pasigis ĉi tie ? »).

Du sistemoj de nombrado uzataj ĉie en la mondo estas la « romana » kaj la « araba ». Ili ambaŭ estas bazitaj sur strekoj, ĉar en la antikvaj tempoj oni devis gravuri ilin en ŝtonojn aŭ en argilon. En la romana sistemo la strekoj estas ĝis nun klare evidentaj. Ekzistas diversaj teorioj pri la enkonduko de romanaj ciferoj, kiuj prezentas kvin (V), dek (X), kvindek (L), cent (C), kvincent (D) kaj mil (M). Mi ŝatas la jenan klarigon : Se ni duonigas horizontale la X-on, ni ricevas la V-on, se ni duonigas horizontale la C-on (skribitan streke) ni ricevas la L-on, se ni duonigas vertikale la antikvan M-on, ni ricevas la antikvan D-on.

Romanaj ciferoj ne estas facile kaj rapide legeblaj – oni devas tre atenti pri la lokigo de ciferoj en pli grandaj nombroj. Ju pli longa estas la ciferaro, des pli verŝajne oni erarus. En la moderna tempo ni ofte devas esprimi nombrojn astronomie grandajn aŭ tre malgrandajn, kaj la romana sistemo ne taŭgas por tio.



Sed kie estas nulo ? La mistera cifero, en kiu matematiko kaj filozofio kongruas ? La nulo evoluis sendepende de la reelaj nombroj kaj tial ĝi meritas apartan artikolon.

Se ni vidas la nuntempajn elegante kurbajn « arabajn » ciferojn, kiu pensus pri strekoj ? Sed ĝuste en strekoj estas kaŝita la genie simpla klarigo. Ni neniam scios, ĉu tio estis la ideo de unuopulo aŭ iom post ioma rezulto de racia pensado de multaj. Do, iu aŭ iuj, organizis strekojn tiel, ke anguloj inter ili (ortaj aŭ akutaj) kaj kvanto de la anguloj esprimas la valoron de la ciferoj (rigardu la bildon).

El arabaj landoj, verŝajne de la « Domo de Saĝeco » en Bagdado kiel centro, la sistemo rapide disvastiĝis danke al vojaĝantaj karavanoj. Dum la epoko de invadoj en Eŭropon kaj Afrikon, ĝi penetris en landojn situantajn en greka kaj romia kultursfero. La akcepto de ĝi ne estis rapida, eĉ oni rezistis ĝin. Tamen, en la 12-a jarcento ĝi montriĝis supera en simpleco kaj klareco. Finfine, eĉ la ĉapitroj kaj paragrafoj de la « Sankta Biblio » ricevis arabajn (islamajn ?) numerojn !

## L'espéranto dans une bataille de géants

*Un article en anglais de Tim Sneath, une tête pensante de Microsoft, a suscité de très nombreux articles et commentaires en diverses langues. Dans cet article intitulé « An Open Letter from the President of the United States of Google » (Une lettre ouverte au président des États-Unis de Google), Sneath s'est moqué de la décision de Google d'abandonner la norme vidéo H.264 en la comparant à celle d'abandonner l'anglais au profit de l'espéranto. L'affaire fait un bruit énorme dans les milieux spécialisés. Beaucoup en profitent pour exprimer leur mépris de Microsoft et Google, surtout de Microsoft. Même si ce n'est pas à propos de l'espéranto, l'occasion se présente pour réagir afin de réajuster son image. Merci Crocosoft ! ;-)* [Henri Masson]

<http://www.liberafolio.org/Members/andrejg/guglokondamno>

<http://www.liberafolio.org/2011/microsoft-estas-la-angla-google-estas-esperanto>

# Skaloj por nombroj

Silvano Auclair

**Nu, kiel diri en Esperanto la nombron  
1 000 000 000 ?**

**Vi eble diros, ke vi ne tiel riĉas por bezoni tiajn  
nombrojn, sed ni ĉiutage uzas ilin, kiam ni  
kalkulas la nombron da teranoj aŭ la nacian  
ŝuldon.**

Respondo : estas du  
respondoj, kaj multe da  
konfuzo.

Ĝenerale, Esperanto  
agas kiel plej multaj  
lingvoj kaj diras  
*miliardo*. Sed... la angla  
agas malsame (unue  
nur en Usono, sed pli  
kaj pli en Britio ankaŭ)...  
tamen grava lingvo. Laŭ  
la uzo de tiu lingvo, oni  
dirus *biliono*...

Kelkaj terminoj : la uzo de la franca kaj de plej  
multaj lingvoj estas nomata *longa skalo* ; tiu de la  
angla (kaj la rusa), *mallonga skalo*.

Nu, problemo malsimplas, ĉar, en la longa skalo,  
*biliono* havas signifon : 1 000 000 000 000 (aŭ  
 $10^{12}$ , ĉar estas 12 nuloj), kio nomiĝus *triliono* en  
la mallonga skalo. Kaj tiel plu por ĉiuj pli altaj  
nombroj. Ni ofte en Kebekio frontas tiun konfuzon,  
kiam artikolo pri financoj estas mistradukita el la  
angla. (*Red. : kaj por aldoni al la konfuzo... en la rusa,  
kie oni ja uzas mallongan skalon, same kiel en Usono,  
oni tamen havas unu solan escepton. En la ĉiutaga  
lingvaĵo, tio, kio estus miliardo en Esperanto aŭ en la  
franca, estus same « milliard » en la rusa...*)



*Unu miliardo da rubloj (en tiama slango, "limardo", kaj  
"miliono" estis "limono"), eldonita en Sovetunio dum  
la inflaciego de la 1920-aj jaroj [Rusa Vikipedio]*

Esperantistoj proponis  
alian sistemon, kun  
vortoj kiel duiliono,  
duiliardo, triiliono,  
k.t.p., fakte simplaj  
esperantigoj de la  
formoj de la longa  
skalo, sed homoj kutime  
simple sekvas la uzon  
de sia patrina lingvo. La  
konfuzo daŭras.

La konfuzo estas eĉ pli  
grava, pro tio ke, de la 19-  
a ĝis la komenco aŭ mezo

de la 20-a jarcento, la franca uzis la... mallongan  
skalon !

## Hinda sistemo

Vi povas legi en tiu ĉi numero de *La Riverego*, ke nia nombrosistemo fakte devenas de Hindio. Nu, tiu konfuzo estas tre grava inter anglalingvaj hindoj. Iuj uzas plu la malnovan britan uzon, t.e. la longa skalo, aliaj la modernan usonan uzon, t.e. la mallonga skalo, sed, preter tiuj du, ekzistas malnova hinda kalkulo. Tre amuza ĝi estas, ĉar, post mil, ĝi grupigas la nombrojn en duopojn, ne triopojn.

Por 1 000, la hindoj diros *hazaar* ; por 10 000, *das hazaar...* cent mil ili skribos 1,00,000 kaj nomos *laĥ* ; dek milionoj skribiĝos 1,00,00,000 kaj nomiĝos *kror* ; kaj tiel plu, centoble kaj centoble.

[fontoj : Vikipedio : *Vortoj por grandegaj nombroj*, kaj Wikipédia : *Échelles longue et courte kaj Numération indienne*]

---

## Plena Ilustrita Vortaro en la reto !

**E@I nun lanĉas donac-kampanjon por kolekti bezonatan sumon 10 000 EUR. Se vi opinias la retan PIV subteninda iniciato, vi povas helpi konstrui ĝin. Kaze de sukcesa kampanjo, la retejo aperos jam ĉi-jare.**

Unu el la plej famaj E-verkoj de la lastaj jardekoj certe estas Plena Ilustrita Vortaro de Esperanto, mallonge PIV. La organizo Edukado@Interreto (E@I) kunlabore kun Sennacieca Asocio Tutmonda (SAT) intencas krei retan kaj senpagan version de la fama PIV. Por tiu celo estis jam subskribita kontrakto, laŭ kiu E@I kreos la retejon, kaj SAT disponigos la enhavon — la elektronikan version de la fama vortaro.

Jam multajn jarojn PIV estas la plej ampleksa difin-vortaro en Esperanto, sed, bedaŭrinde, pro sufiĉe granda kosto, la papera eldono ĝis nun estis havebla nur por relative malgranda grupo de Esperanto-parolantoj. Post apero de la reta versio la situacio tute ŝanĝiĝos, la vortaron povos uzi tute senpage ĉiuj uzantoj, kiuj havas aliron al la interreto.

La adreso de la nova projekto estos [www.vortaro.net](http://www.vortaro.net). Jam dum kelkaj jaroj E@I posedas tiun ĉi domajnon, sed nur ĉi-jare, post la subskribo de la kontrakto, tiu ĉi mallonga kaj facile memorebla adreso povas finfine ekhavi sian plej bonan enhavon — retan version de PIV. Ĝis la apero de PIV ĉe tiu ĉi adreso, vi povos trovi ĉiujn bazajn informojn pri la projekto, la projekt-fluo kaj eblon finance kontribui al la projekto.

[Laŭ [www.vortaro.net](http://www.vortaro.net)]

## Kiu inventis la « arabajn » ciferojn ?

Ĵenja Amis



*L'auteure explique l'origine des chiffres « arabes » et quelques similitudes entre eux et l'espéranto.*

**La historio de la « arabaj » ciferoj jam delonge fascinas min. Fakte, ĝi eĉ iom pensigas min pri Esperanto : inventaĵo genie simpla kaj logika, fleksebla kaj facile lernebla. Same kiel en Esperanto oni povas krei novajn vortojn per aldono de sufiksoj kaj prefiksoj, oni povas krei « novajn » numeralojn per la ŝanĝo de la pozicioj de diversaj ciferoj, el kiuj ĝi konsistas. Eŭropaj kleruloj (ĉefe, religiuloj) dum jarcentoj rezistis la « arabajn » ciferojn, ĉar ili konsideris ilin minaco al ilia povo (« nu, kion fari, se kiu ajn povus lerni kalkuli ?! »). Sed malgraŭ ĉio, tiu genia inventaĵo fariĝis la universala lingvo de matematiko. Nu, eble post kelkaj jarcentoj tio estos ankaŭ la historio de Esperanto ?**

Kiel vi rimarkis, mi metis la vorton « araba » en citilojn. Mi tion faris, ĉar fakte tiu ĉi sistemo ne venas de Arabio – laŭ la sciencistoj, ĝi aperis en Hindio ĉirkaŭ la jaro 500 p.K. kaj estas bazita sur la brahmana nombrad-sistemo, kiu siavice datiĝas de ĉ. 300 a.K. La brahmana sistemo,


○ 0 śūnya	५ 5 pañca
१ 1 éka	६ 6 ṣaṣ
२ 2 dvi	७ 7 saptá
३ 3 tri	८ 8 aṣṭá
४ 4 catúr	९ 9 náva

kvankam simila laŭaspekto al la hinda sistemo (el kiu « naskiĝis » la « arabaj » ciferoj), diferencis de ĝi laŭ la esenco : ĝi ne uzis la pozicion de la ciferoj por indiki ĝian valoron, ekzemple, 10, 20, 30 ne estis skribitaj per 1, 2, 3 kaj 0, sed havis tute malsamajn simbolojn. La hinda sistemo populariĝis en la najbara Persio, kaj poste en la arabaj landoj, de kie ĝi estis alportita en Eŭropon (de tio, do, la adjektivo « araba »). Por esti tute korekta en la difinoj, oni rekomendas nomi niajn modernajn ciferojn « hind-arabaj » aŭ « arab-hindaj ».

Vidu sube en la kesto la liston de la hindaj numeraloj en la moderna skriboformo (Devanagari), kun la respondantaj eŭropaj ekvivalentoj kaj la sanskrita prononco. Oni povas klare vidi la similecojn (la vortoj por du, tri, kvar, ses kaj sep estas tuj kompreneblaj). Kaj mi aldonos personan rimarkon : antaŭnelonge mi spektis kurd-lingvan filmon, kaj la solaj vortoj en la kurda, kiujn mi povis distingi sen legi la subtitolojn, estis ĝuste la vortoj por ciferoj!

Interesas rimarki, ke la sanskrita vorto por nulo (shunya) estis tradukita en la araban kiel « sifr » (« nenio »), kiu fariĝis « zephirum », kaj tiam « zero » — kaj de kio, verŝajne, originas ĉiuj terminoj havantaj « cifer »-rilatan radikon (cifero, ĉifro, deĉifri k.t.p.).

Ankaŭ indas noti, ke la aspekto de la hind-arabaj ciferoj evoluis iom malsame en la aziaj (inkluzive de arabaj) landoj. Vidu sube la bildon de moderna egipta telefon-panelo kun du tipoj de ciferoj : eŭropaj kaj arabaj. Estas interese noti, ke en la araba lingvo oni ĝis nun nomas siajn modernajn numeralojn « hindaj »!



La adopto de la hind-arabaj ciferoj en Eŭropo ne estis la afero de unu tago. Kvankam ili estis konataj jam ekde la 10-a jarcento, ili ricevis vastan uzon nur post la invento de presado. Tiu ĉi malfruo estis unuavice pro la granda kontraŭstaro fare de la eklezio : pro la deziro koncentri la sciencan en la sino de la religio kaj, kompreneble, la deziro rezisti ĉion nekristanan. (Kaj ni memoru, ke temas pri la 10-13-a jarcentoj, la tempo de la kruc-militoj!)

Jen plia paralelaĵo kun Esperanto : ĝi estas

« fremda » (en pli bona kazo), aŭ « juda » (en pli malbona kazo). Nu, kaj krome, ĉu oni volonte fordonas la ilojn de sia potenco (kiel la lingvo)?

[Laŭ Vikipedioj : E-a, angla kaj rusa]



Gregor Reisch, *Margarita Philosophica*, 1508 (la bildo reprezentas la kontraŭstaron de la « nova » kaj « malnova » mondo de matematiko : hind-araba kalkulado kaj romia abako). [Vikipedio]

## Strato Zamenhof : Kien?

*Michela Lipari*

La 18-an de novembro 2010 okazis en Ancona, centr-itala urbo, la naŭan fojon, la transdono de la premioj Zamenhof, al italaj homoj aŭ institucioj, kiuj elstaras en la kunlaborado inter la popoloj, en la agado por paco, por helpo al evolulandoj kaj al tiel nomataj minoritataj lingvoj. Unu el la tri premiitoj estis prof. Rocco Altieri, interesa personeco en la itala kaj internacia pacista medioj.

Kadre de la jardeko de UNESKO de la kulturo por neperforto, en 2000, prof. Altieri sukcesis establi en la universitato en Pisa la unuan kaj bedaŭrinde ankoraŭ nun la nuran centron de sciencoj por la paco, kiu transformiĝis al kvinjara magistrecita kurso « scienco por la paco, internacia kunlaborado kaj neperforta transformo de konfliktoj ».

Simpla, modesta homo, tre afabla, li akceptis esti de mi intervjuata pri sia agado kaj mond-koncepto.

Prof. Altieri sin difinas sekvanton de Gandhi, kaj fakte aŭtoris kaj editoris plurajn librojn pri kaj de la plej grava barata personeco. Li klarigas, ke konflikto



ne estas sinonimo de milito, konflikto povas esti socia transformiĝo por elimini perfortojn, sociajn maljustaĵojn, kaj ke la agado lia kaj de liaj kolegoj estas instrui solvi la konfliktojn, sen ke ili degeneru en militojn.

La doktoriĝintoj estas junuloj, kiuj trovas sian vojon en internaciaj pacaj (li substrekas vere pacaj) misioj de internaciaj organizaĵoj, ĉar la paco, pli ol la milito, bezonas esti zorgata de spertuloj. Do samkiel ekzistas pluraj institucioj por pretigi junulojn al milito (ekz., la marista kaj la aviada akademioj), sian ekzistokialon havas institucio por eduki pri paco, kaj pro tio, sekvante la idealojn de Tolstoj, de

Zamenhof kaj de Gandhi, li multe agis por realigi tiun « porpacan akademion ».

Li estas tre danka, ke oni decidis atribui al li ĉi-jare la Premion Zamenhof, ĉar li taksas ke tio estas la nura porpaca premio, kiu ne referencas al surfaca « pacismo », sed kiu vere funde kaj ĝiskerne elektas siajn premiatojn. Kaj krome, kiel movado, ni aparte fokusas lingvon, kio estas esenca elemento de la komunikado, kaj la interpopola komunikado permesas transiri la nekomprendadon kaj do konstrui veran



realan kulturon de paco. La lingvaĵo estas la simbola dimensio, kiu transcendas la antaŭjuĝojn kaj permesas atingi la neperfortan solvodon de konfliktoj.

La studentoj venas el la tuta Italio kaj foje ankaŭ el eksterlando, kaj la ĉiujara aliĝintaro estas inter 70 kaj 100 studentoj. La ministerio pri edukado en la antaŭa jaro intencis forigi la kurson, sed dank' al nacia kaj internacia solidareco la kurso pludaŭras.

Nia celo estas eltrovi science la kaŭzojn de konfliktoj, kiuj povas esti kulturaj, strukturaj, ekonomiaj, do ni celas eltrovi la specifajojn por solvi la unuopajn konfliktojn.

Kaj nun mi volas respondi al la demando en la titolo. Kien strato Zamenhof? Jen kie: en tiu universitata kurso, ĉar serĉante en la katalogo de la itala eldonejo Giuntina, kiun li taksas tre serioza kaj interesa kaj kies eldonaĵoj facile troveblas en la italaj librovendejoj, prof. Altieri trovis la libron *Via Zamenhof (La Zamenhof-strato)*, ĝin aĉetis, legis, kaj tuj ĝin enmetis en la liston de la konsilataj libroj por siaj studentoj.

Do, jen plia atingo de tiu grava verko: iĝi lernolibro en itala universitato!

[revuo Esperanto, januaro 2011; kun la permeso de la aŭtorino kaj la eldonanto]

## Deux films sur l'espéranto en 2011

Nous attendions un film documentaire professionnel sur l'espéranto pour 2011. Nous en aurons deux, un en français, l'autre en anglais. Dans les deux cas, les cinéastes sont déjà connus pour d'autres films documentaires: le Français Dominique Gautier, et l'États-Unien Sam Green qui a déjà touché l'espéranto en partie dans le film *Utopia in Four Movements (Utopie en quatre mouvements)*. Celui de Dominique Gautier, dont le tournage a commencé en novembre 2009, mais dont le titre n'a pas encore été choisi, était déjà prévu. Des précisions apparaissent en espéranto sur Esperanto-filmo et Filmoj.net.

En ce qui concerne celui de Sam Green, le titre est *The Universal Language*. Sam Green a déjà filmé des événements en relation avec l'espéranto, entre autres des congrès universels, par exemple celui de Yokohama. Il a interviewé, entre autres, le professeur Humphrey Tonkin et l'auteure du livre *In the Land of Invented Languages (Au pays des langues inventées)*, Arika Okrent. Paru le 12 janvier, sur *Libera Folio* sous le titre *Nova dokumenta filmo pri Esperanto*, un entretien avec Sam Green par Chuck Smith, le fondateur de la version en espéranto de Wikipedia, mérite d'être lu. Il y apparaît que Sam Green a une idée positive de l'espéranto. La version originale de l'entretien se trouve sur l'Espéranto-blog de Chuck Smith sous le titre *Esperanto documentary: The Universal Language*:

<http://www.transparent.com/esperanto/esperanto-documentary-the-universal-language/>

Il y a lieu d'espérer que des versions des deux paraîtront dans d'autres langues. C'est prévu au moins pour le documentaire en français...

[Henri Masson]

## NASK 2011:



## Sama Kurso en Nova Vesto !

**La Nord-Amerika Somera Kursaro de Esperanto (NASK) ŝanĝas la formaton de la 42-a sesio en 2011 ! Anstataŭ la tri-semajna daŭro, NASK okazigos mallongan sesion de nur sep tagoj de intensa instruado dum la usona feria semajno de la 4-a de julio (2-10-a de julio 2011). Tiu ŝanĝo estas farita por allogi la lernantojn kiuj ne havas sufiĉe da feria tempo aŭ mono por pli longa sesio. La loko — la sunplena kampuso de la Universitato de Kalifornio, San Diego (UCSD) — restas la sama. Ĉiu inter la aĝoj 16 kaj 96 (aŭ eĉ pli) de ĉie en la mondo estas bonvenaj !**

Mallonga tempo kaj malmultekosta kursaro (kiu ne enkalkuliĝas kiel universitata studo) ebligas pli da libereco en la aranĝoj. Pro la lunda feria tago en Usono, la usonanoj devos foresti de la laborejo nur kvar tagojn ( kvin por ne-usonanoj). Vi povas do alveni sabaton, la duan de julio, kaj foriri jam la dekan.

Partoprenantoj loĝos kvarope en apartamentoj kun individuaj dormĉambroj, kun tri manĝoj tage, en la apartamentejo Internacia Domo. La manĝejoj kaj klasĉambroj situas apude. Oni povas profunde studi Esperanton kaj eĉ havi tempon partopreni la usonan feston de la Sendependec-Tago kun piroteknikaĵoj en la apuda urbeto La Jolla !

Birke Dockhorn el Germanujo, Bertilo Wennergren el Svedujo kaj Lee Miller el Usono planas divers-nivelajn formalajn klasojn ĉiutage kun kromaj programeroj en la posttagmezo kaj vespero. Hoss Firooznia, help-instruisto, gvidos ekskursojn kaj prizorgos la eksterlecionajn eventojn. Grant Goodall, profesoro en la Universitato de Kalifornio en San Diego kaj direktoro de ties lingva fakoj, estros la kursaron. Estas jam la dua fojo por ĉi tiu teamo, kiu sukcese kuninstruis en 2008.

Ĉi-jare estas rabatita prezo por ĉiuj, kiuj aliĝos antaŭ la 15-a de marto (865 USD), kaj estas aparta prezo por plentempaj studentoj kaj latin-amerikanoj (665 USD antaŭ la 15-a de marto), ĉio inkluzivita. Pli da detaloj kaj fotoj troviĝas ĉe: <http://esperanto.org/nask>  
Informoj pri prezoj kaj pag-manieroj: <http://esperantic.org/eo/edukado/nask> Por informoj pri registriĝo, stipendioj k.t.p., kontaktu la administranton, Ellen Eddy: eddyellen(ĉe)aol.com.  
[*Esperantic.org*]

# La viro, kiu trinkis kurante

*Francisko Lorrain*

**Jen vera rakonto. Antaŭ dudeko da jaroj, mi gvidis vesperan klason de matematiko por plenkreskuloj. Unu fojon, mi estis doninta eble iom tro longan periodon da tempo por ekzercoj, je la fino de la vespero. Krom kelkaj persistemuloj, ĉiuj estis jam foririntaj.**

Tiam iu studentino, kiu havis tipan Latin-Amerikan aspekton kaj akĉenton, elironte, salutis min. Ni komencis babili kaj mi demandis ŝin, el kiu lando ŝi estas, kaj tiel plu. Ŝi estis el Gvatemalo. Ŝi devis fuĝi la landon kun sia edzo kaj infanoj.

Ŝia edzo havis planto- kaj flor-vendejon. Kompreneble, li ofte vizitis diversajn farmbienojn en la kamparo por aĉeti plantojn por la vendejo. En tiu tempo aktivadis la t. n. « mortoskadroj » : ekstrem-dekstraj grupoj, kiuj, kaŝe kaj nepunite, persekutis ĉion eĉ ŝajne maldekstrecan. Envenis en la kapo de iu tia grupo, ke tiu florvendisto estas ja suspektinda, ĉar li daŭre rilatas kun kamparanoj — ĉiuj suspektindaj homoj, ĉar kampare kaŝas sin gerilanoj kaj ĉiuspekaj opoziciuloj. Tiu mortoskadro iun tagon kaptis lin, kaj enŝlosis lin, kune kun kelkaj aliaj suspektatoj, en ĉambron de iu kazerno.

Tiu ĉambro ne estis ordinara ĉelo, sed simpla staplejo. La enhavo de la ĉambro estis metita en la koridoron, la malliberejoj enirigitaj, la pordo fermita, kaj fine la staplaĵoj stakigitaj (laŭ tio, kion ili povis aŭdi) kontraŭ la pordo en la koridoro. Kial tia stakado ? Ĉar la mortoskadroj devis kaŝi sian agadon,

por ke oni ne sciu, ke ili estas apogataj de la registaro.

Dum longaj horoj, la kaptitoj kaŝis en sia ĉambro. Sen manĝi aŭ trinki. Sen necesejo... Ili aŭdis normalajn bruojn en la koridoro. Kelkfoje ili provis kriegi por atentigi la preterpasantojn malantaŭ la pordo. Nenio.

Post du tagoj ili malsategis, soifegis, kaj ne kapablis plu elteni. Fuĝi tra la alta fenestreto ne eblis, eĉ por la plej maldika el ili. Iu el la kaptitoj ekprenis ŝtonon, kiu kuŝis tie, kaj komencis frapadi per ĝi la eksteran muron. Alia trovis ŝtonon kaj helpis la unuan. Neniu ene de la kazerno atentis ilin. La muro estis nur ordinara malaltkvalita muro. Baldaŭ ili sukcesis fari truon sufiĉe grandan por eliri.

Sed tiam ekpluvis. Unu el tiuj tropikaj pluvegoj, kiuj donas la impreson ricevadi sur la kapon plenajn sitelegojn da akvo.

— Ĉu ni atendu la finon de la pluvo ?

— Male ! Jen ĝuste la tempo eskapi, kiam ĉiuj gardistoj ŝirmas sin en la kazerno !

Unu post la alia, ili ĵetis sin eksteren kaj kuregis, kuregis por savi sian vivon.

Sed la soifo tiom turmentis la flor-vendiston, ke, dum li kuris per sia tuta forto, li samtempe klinis la kapon malantaŭen kaj trinkadis, trinkadis, rekte el la ĉielo ! Post lia eskapo, li tuj kontaktis sian familion — singarde kaj kaŝe, kompreneble — kaj ili baldaŭ ĉiuj fuĝis el la lando.



*Charles Dockery*

### Dancantaj anĝeloj

Ilia dancejo  
Ege malgranda  
Nekutima loko  
Vera miraklo.  
Kiu krom anĝeloj  
Scipovas valsi aŭ rumbi  
Sur kudrilpinto ?

\*\*\*

### Homamaso ĉe infer-enirego

Kian veturilon atendas ili  
Por la vojaĝo malsupren ?  
Eble ili atingos stacidomon  
Per antikva remboato  
Aŭ moderna, rapidega transporto.

\*\*\*




### Teologiaj obsedoj

Pasiaj pensuloj  
Obsediĝas pri pekoj  
Pri virino en ĝardeno  
Pri serpento en arbo.  
Kiu prizorgos trudherbojn ?  
Kiu akvumos florojn ?

\*\*\*

### Marbordaj mirindaĵoj

Mevoj transiras ĉielbluon  
Ŝanĝas direkton flugante horizonten  
Instinkte leviĝas miaj okuloj  
Kaptas mian atenton  
Kaŝludo inter sunbrilo kaj nuboj.  
Pli kaj pli mia rigardo supreniras  
Pli kaj pli mia animo kuraĝiĝas



### George Soros vizitas E-simpozion en Novjorko

<http://esperantic.org/en/communications/news?n=32>

[Esperantic Studies Foundation]

### Finiĝis la Esperanto-elsendoj de Pola radio

<http://www.liberafolio.org/2011/finigis-la-esperanto-elsendoj-de-pola-radio>

[Libera Folio]

### Prezento de la IJK 2011 en Ukrainio

[http://www.youtube.com/watch?v=C3KE9uFJONs&feature=player\\_embedded](http://www.youtube.com/watch?v=C3KE9uFJONs&feature=player_embedded)

aŭ serĉu IJK prezento.wmv en <http://www.youtube.com>

[TEJO Aktuale]

### Funkolando (Sexy Esperanto)

Humura kanzono Funkolando (Sexy Esperanto) de Jean-Marc Leclercq (JoMo) estas unu el la plej furoraj muzikvideoj de Esperantujo. Ĝin spektis pli ol 1000 personoj nur en la debuta semajno. Ĝi estas registrita en Francio fare de disk-ĵokeo Roĝer Borĝes (<http://mixcloud.com/rogerborges>), kaj en la video kunlaboras ankaŭ usona aktorino Katharine Brownshire kaj amaso da volontuloj (eĉ mondmuzika ensemble !). Spektu la rezulton de tiu freneza miksaĵo ĉe <http://www.bit.ly/funkolando>

[TEJO Aktuale]

### Gramatika kontrolilo de Esperanto

La gramatika kontrolilo Lingvollo-1.2 (LanguageTool-1.2) haveblas kaj nun funkcias en la lingvo internacia (inter multaj aliaj lingvoj). Pli da informoj (ekranfotoj, instrukcioj por instalado, ktp.). Hejmpaĝo de Lingvollo (LanguageTool) :

<http://www.languagetool.org>

Elŝutebla dosiero de Lingvollo-1.2 :

<http://www.languagetool.org/download/LanguageTool-1.2.oxt>

[programistoj-respondas]

### Le recueil de chansons Wiki a maintenant plus de 2000 textes

Depuis l'année 2003, kantaro-vikio — autrement dit *libera kantaro* (recueil libre de chansons) — est le lieu de tout usager de l'espéranto porté sur la musique et la chanson. Les textes de chansons, les notes, les vidéos et autres choses musicales y sont nombreux. Fonctionnant sur le principe de Wikipédia, il permet un travail commun d'utilisateurs de l'espéranto de diverses parties du monde. Au début, il n'y avait que des textes de chansons, mais beaucoup d'autres possibilités ont été ajoutées par la suite : notes de musique, accords, vidéos, textes de recueils sur papier, etc. <http://kantaro.ikso.net/>  
[Henri Masson]

# Honora membro de ESK — Edmond Brent — Kajmo, forlasis nin

*Zdravka Metz*

**Fine de novembro, mi vizitis Kajmon en hospitalo, tuj post urĝa operacio. Estis ja vespero, kaj Kajmo babilis tiom ĝoje, kvazaŭ li ne havus ankoraŭ ĉiujn tubetojn, kiujn venis foje kontroli flegistinoj.**

Li mendis la librojn *La Eta Princo* kaj *Vivprotokoloj*, kaj mi alportis ilin. Li feliĉis pro la perfekteco de *La Eta Princo*, kaj kun entuziasmo li rakontis pri la deziro eldoni kongresmaterialojn de TAKE-7...

La malsano, kiu trafis lin, lastan someron, malebligis al li marŝi, sed li ne ĉesis sian laboremon kaj daŭre planadis Esperantajn projektojn. Esperanton li aprezis, kaj la internacia lingvo estis por li la plej bela lingvo inter dekkvar lingvoj, kiujn li flue parolis kaj pri kiuj li regule ekzerciĝis kun la edzino Kora.

Kajmo komencis instrui Esperanton en Germanio, en gimnazio, en la tiel nomata Greka klubo. Poste

li havis la eblecon instrui en Toronto, St. Catharines (Ontario) kaj San Francisco (Usono). Esperanto venigis Kajmon al Oakville (Ontario) en 1957 por labori en la eldonejo Esperanto-Press kun la familio Eichholz. Li estis tradukisto kaj reviziisto por esperantigo de infanaj libroj.

Li ĉefe aktivis internacie kiel socilingvisto kaj esperantologo.

En Kanada E-Asocio Kajmo okupis lokon de vicprezidanto kaj estis aktiva kaj ŝatata preleganto. Multaj ŝatis aŭskulti lin interparoli, prelegi, gvidi laborgrupojn. Lia perfekta prononcado ja estis modelo kiel paroli Esperante.

Okaze de la Zamenhofa vespero en 2005, por danki lian kunlaboron por la libro *Nanatisis*, Kajmo estis nomita honora membro de ESK.

En 2006, li akceptis esti prezidanto de la kongresa



komitato por TAKE-7, kiun organizis ESK kaj kiu okazis en Montrealo dum la somero 2008. Kiam mi pensas pri Kajmo, ankoraŭ sonas en miaj oreloj la anekdoto, kiel li kaŝe lernis Esperanton per la libro, kiun li aĉetis por si kiel kristnaskan donacon en 1948. Li sciis, ke la patro konas la lingvon, sed li volis surprizi la patron per tio, ke li jam parolus la internacian lingvon. Do, li lernis dumnokte, kaj tage iris lernejon havante ruĝajn okulojn... Li konsideris sin kiel duan generacion en la familio. La tria generacio estis lia filino Karine, kies denaska lingvo estis Esperanto...

Komence de januaro mi ricevis la sekvan leteron, kiu nun restas ne respondita.

« Kara Zdranjo,  
Mi ĵus ankoraŭfoje aŭskultis kaj spektis la belan kantovideon de la Keltaj Virinoj, kiun ci sendis al mi jam antaŭ Kristnasko. Mi forgesis respondi al ci tiam kaj nun diras dankegon! Samtempe mi ĉi-okaze ripetas miajn novjarajn bondezirojn al ci kaj ciaj familianoj. Fartu bone kaj dankon ankoraŭfoje pro ĉio kion ci faris por mi lastatempe, tiu cia helpo tre gravis al mi. Cetere mia sanstato pliboniĝadas.  
Kore, Kajmo »

Restas silento...  
Kajmo fermis la okulojn porĉiame meze de januaro 2011 en Montrealo.

Nun mi volas diri DANKON al Kajmo pro la konsiloj pri plurlingva instruado al miaj infanoj. Mi aparte aprezis tiun lian sperton, kiu helpis al mi.

Nome de la ESK-anoj mi esprimas sincerajn kondolencojn al Kora kaj ŝia filo Korano.

## La unua kaj la lasta... Ĵenja Amis

**La novaĵo pri la morto de Kajmo estis granda ŝoko por mi. Kiam mia edzo kaj mi vizitis Kajmon en la hospitalo decembre, li estis tre entuziasma kaj ŝajne senlaca ; li diris, ke la operacio bone iris, kaj li planis baldaŭ reveni hejmen. La flegistinoj venis de tempo al tempo por diversaj proceduroj, kaj li tute ne atentis, kiam ili prenis sangon aŭ kontrolis la tubetojn. Li vere estis brila parolanto, kaj estis vera plezuro aŭskulti la rakontojn el lia vivo kiel esperantisto jam kun pli ol 60 jaroj (!) da sperto. Eĉ en la hospitalo li senĉese laboris por Esperanto kaj tre volis eldoni la materialojn el TAKE 2008.**

**Mi tre bedaŭras, ke tiu ĉi renkontiĝo kun Kajmo estis la unua kaj la lasta. La morto de Kajmo estas grandega perdo ne nur por lia familio kaj por ESK, sed por la tuta Esperanto-movado...**

## Montrealaj Esperanto-Kunvenoj (MEK)

<i>Tago</i>	<i>Dato</i>	<i>Horo</i>	<i>Loko</i>	<i>Temo</i>
Vendredo	25-a de marto 2011	19 h 30	MEDO	
Vendredo	29-a de aprilo 2011	19 h 30	MEDO	
Vendredo	27-a majo 2011	19 h 30	MEDO	
Vendredo	17-a de junio 2011	19 h 30	Commensal St-Denis*	
Vendredo	30-a de septembro 2011	19 h 30	Commensal St-Denis*	Jarkunsido de ESK
Vendredo	28-a de oktobro 2011	19 h 30		
Vendredo	25-a de novembro 2011	19 h 30		
Sabato	17-a de decembro 2011	19 h 30	Commensal*	152-a datreveno de L.L. Zamenhof

**Commensal St-Denis (Restaurant végétarien Montréal – rue Saint-Denis) : 1720, rue St-Denis (entre Maisonneuve et Ontario, métro “Berri-UQAM”), Montréal.**

[http://www.commensal.com/fr/ou/restaurants/saint\\_denis](http://www.commensal.com/fr/ou/restaurants/saint_denis)

## Pliaj Esperanto-renkontiĝoj

21-23-a de majo 2011	8-a MEKARO (Mez-Kanada Renkontiĝo de Esperanto)	Kingston, Ontario
<b>17-20-a</b> de junio 2011	Kongreso de Esperanto-USA <b>Notu la datŝanĝon!</b>	Emeryville, Kalifornio
8-10-a de oktobro 2011	ARE (Aŭtuna Renkontiĝo de Esperanto)	Silver Bay, Nov-Jorkio
19-21-a de majo 2012	9-a MEKARO (Mez-Kanada Renkontiĝo de Esperanto)	Kebeko, Kebekio





**Esperanto-Societo Kebekia**  
**Société québécoise d'espéranto**

**La Riverego** estas eldonata de la Esperanto-Societo Kebekia kvarfoje dum la jaro : marte, junie, septembro kaj decembre. Pri la enhavo de la artikoloj respondecas la aŭtoroj mem. Oni rajtas kopii la artikolojn, kun nepra indiko de la fonto. Senpage por la membroj de la ESK. UEA-kodo de la Societo: kebk-d.

**Redaktado kaj grafiko:** Yevgeniya Amis (riverego(ĉe)esperanto.qc.ca).  
**Korektado kaj lingva konsilado:** Silvano Auclair kaj Francisko Lorrain.  
**Estraranoj de ESK:** Normand Fleury (prezidanto), Suzanne Roy (vicprezidanto), Sylvain Auclair (sekretario), Pierre Pouliot-Lavoie (kasisto), Yevgeniya Amis (konsilanto).

**Limdato por la venonta eldono /**

**Échéance pour le prochain numéro : 2011.5.20**

En plus de la Société québécoise d'espéranto, il existe au Québec plusieurs clubs d'espéranto. Pour ajouter votre club à cette liste ou annoncer une activité, écrivez-nous à **riverego(à)esperanto.qc.ca**

**Montreala Esperanto-Domo (MEDO)**  
**6358-A, rue de Bordeaux, Montréal, H2G 2R8**

(Vidu retejon por vidi kiel atingi)

(Voir site web pour un plan d'accès)

*Libroservo, biblioteko nepre kun antaŭa rendevuo*  
*Librairie, bibliothèque sur rendez-vous seulement*

**La Riverego** (*Le Fleuve*) est publié par la Société québécoise d'espéranto quatre fois par année, en mars, juin, septembre et décembre. Dépôts légaux : Bibliothèques nationales du Canada et du Québec. Premier trimestre 1986. ISSN 1923-1067. Le contenu des articles est sous la responsabilité des auteurs. La reproduction des articles est permise avec mention obligatoire de la source. Gratuit pour les membres de la Société québécoise d'espéranto.

**Rédaction et graphisme:** Yevgeniya Amis (riverego(à)esperanto.qc.ca).  
**Correction:** Silvan Auclair et François Lorrain. **Administrateurs de la SQE:** Normand Fleury (président), Suzanne Roy (vice-présidente), Sylvain Auclair (secrétaire), Pierre Pouliot-Lavoie (trésorier), Yevgeniya Amis (conseillère).

**6358-A, rue de Bordeaux • Montréal • H2G 2R8**  
**info@esperanto.qc.ca • www.esperanto.qc.ca**

**Service de librairie postale à Montréal**

**La libroservo de KEA en Montrealo akceptas mendojn rete kaj letere. Konsultu la retejon por pliaj informoj.**

**Service de librairie postale à Montréal**

Le service de librairie de KEA accepte les commandes par courriel et courrier. Consultez le catalogue en ligne.

[www.esperanto.qc.ca/katalogo](http://www.esperanto.qc.ca/katalogo)

**Pasporta Servo 2011 !**

**Aliĝu tuj se vi volas esti gastiganto kaj bonvenigi esperantistojn ĉe vi :**

**[www.pasportaservo.org](http://www.pasportaservo.org).**

**Vi povas ankaŭ kontakti Normandon (normandlfleury(ĉe)esperanto.qc.ca), kiu estas la peranto por Kanado.**